**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Abonu la modernan
revuon
"Eŭropa Esperanto-Revuo"
Jarabono 16,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 11/1975 - 26 mar 1975
Aperas ĉiusemajne

## Satiraĵoj de Ephraim Kishon en Esperanto

Nürnberg (pp) En "Eŭropa Esperanto-Revuo",kiu aperas en la eldonejo Ludwig Pickel, estos publikigataj en la venontaj numeroj satiraĵoj de la israela verkisto Ephraim Kishon, tradukitaj de Gerhard Ziegler, Osnabrück.

En letero al Gerhard Ziegler, kiun ni ĉi-sekve kopias, Ephraim Kishon donis la permeson kaj rajton, traduki liajn verkojn en Esperanton kaj publikigi ilin.".. I'll be pleased to read your printed translation." (Plaĉos al mi legi vian presitan tradukon), li aldonis.

EPHRAIM KISHON
48, HAMITNADEV STREET
AFEKA 69 690, ISRAEL

Dear Mr. Ziegler,

many thanks for your kind letter. I'm pleased to authorize you, to translate my works into Esperanto - and I'll be pleased to read your printed translation.

Please, go on!

With warmest regards and wishing rapid recovery

Sincerely yours

E. Kishon

1.1.75.

Inter la publikigotaj satiraĵoj el la libro "Ne tiel laŭte antaŭ Jeriĥo" estos: Eĉ lavmaŝino estas nur homo kaj Pri la vivo kun komputeroj.

## Denove Eŭropa Esperanto-Kongreso

Raporto pri estrarkunsido de GEA

Wuppertal. (pp) Elsbeth Bormann, estraranino por informado de GEA, sendis al ni jenan raporton pri la estrarkunsido de GEA en Wuppertal la 15 kaj 16 marto 1975:

"Dum pli ol 9 horoj la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) sub gvido de d-ro Werner Bormann pritraktis la necesajn aferojn. La tagordo enhavis 23 punktojn; ĉiuj estraranoj kolektiĝis akurate. En la komenco ili konstatis, ke la rilatoj al UEA kaj ĝia estraro estas en bona ordo.
Por la venonta Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch dum Pentekosto estis pridiskutitaj la programo de la kongreso mem kaj speciale por la jarĉefkunveno kaj la elekto de pliaj estranoj, se eblas. Por la venontaj Germanaj Esperantaj Kongresoj la estraro decidis proponi al la jarĉefkunveno la akcepton de la invitoj de

Eindhoven - dum pasko 1976 Eŭropa Esperanto-Kongreso kune kun la belgaj kaj nederlandaj Esperanto-asocioj;

Bonn - en aŭtuno 1976 en Bonn konferenco kun politikistoj de ĉiuj partioj de la Parlamento pri la lingva problemo;

Paderborn - dum pentekosto 1977 Germana Esperanto-Kongreso, antaŭ aŭ post la kongreso konferenco pri Esperanto kaj informatiko.

La estraro decidis favori la ideon, ke eksterlandaj gastoj faru prelegvojaĝon ankaŭ tra Federacia Respubliko Germanio.

Ĉiam aperas artikoloj pri lingvaj demandoj kaj ofte ili estis senditaj al la estraro de GEA por fari la respondon. La estraro nun trovis komisiiton inter la aktivuloj de GEJ, kiu sistemigos tiun laboron kaj zorgos pri respondoj. En specialaj kaŭzoj la estrarnoj de GEA kunagas kiel ĝis nun.

Pri la kunagado en la kampo de "ĝemelaj urboj" intertempe ankaŭ venas pli da demandoj kaj petoj pri helpo. La estraro kun ĝojo akceptis la pretecon de la Esperantogrupo Herford, speciale s-ino Lindner, kunlabori en tiu kampo.

Antaŭ la Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch la grupoj ricevos pli detalan informon pri kelkaj Esperanto-aferoj pere de s-ro Heiß.

GEA eldonos en la venontaj semajnoj novan prospekton por pli vasta varbado ekster niaj rondoj. Ĝi estos bone uzebla dum forioj aŭ similaj arangôj.

Dum la estrarkunsido estis ankaŭ pridiskutitaj kelkaj aliaj aferoj, interalie pri la GEI (Germana Esperanto-Instituto), la venontaj Ligo-kunvenoj en Germanio, la aktivado inter socialdemokratoj ankaŭ por la iniciato de la italaj socialdemokratoj en Romo. La bilanco de la pasinta jaro trovis la aprobon de la estraro. La kontaktoj al la instancoj en Bonn estas flegataj.

La etoso de la estrarkunsido estis tre bona kaj la laborriĉaj horoj flue pasis. La estraro esperas, ke la membraro de GEA venos multnombre pentekoste al Oberkirch."

## Esperanto-Semajnfino en Bremen


Bremen (pp) La 12 kaj 13 aprilo 1975 la Esperanto-Grupo Bremen aranĝos internacian semajnfinon. La renkontiĝo donos la eblecon, trovi aŭ refreŝigi la kontakton kun esperantistoj kaj el nia regiono kaj el la najbaraj Nederlando kaj Britio. Loko: Sindikata junulardomo "Zum Kuhhirten". Informojn donas: S-ino R. Bohn, 28 Bremen, Helgolander Str. 58

**Nürnberger Esperantozeitschrift**

Die erste Nummer einer europäischen Esperanto-Zeitschrift (Europa Esperanto-Revuo) ist jetzt im Esperanto-Verlag in Nürnberg herausgekommen. Die „unabhängige internationale Zeitschrift“ soll jährlich mit acht Ausgaben erscheinen. Als verantwortlich für den Inhalt zeichnet Ludwig Pickel. Die erste Nummer enthält unter anderem ein Geleitwort des Vorsitzenden des Deutschen Esperanto-Bundes, Dr. Werner Bormann (Hamburg), und einen Leitartikel „Sprachpolitik für Europa“ von Prof. Dr. Helmar Frank (Paderborn).

Pri la unua numero de Eŭropa Esperanto-Revuo raportis loka gazeto de Nürnberg "Nürnberger Zeitung" de la 24 marto 1975

*********************




Unu fojon ankoraŭ la Internacia Foiro de Barcelono eldonis la Oficialan afiŝon en Esperanto.

Jam por la 17a jaro sinsekve!

Krome en la kadro de la Foiro, Hispana Esperanto-Instituto havos standon kiel informejon pri la Internacia Lingvo dum la daŭro de la Foiro, por la 9a fojo jam!

Vidu la apudan foton!

Festa kunsido de la PEA-estraro en Krakovo

Krakovo (pp) Laŭ informoj de Pola Radio la estraro de Pola Esperanto-Asocio havis plenkunsidon okaze de la Jartrideko de Popola Pollando. En telefona raportaĵo Jerzy Grum sciigis, ke la festparoladon faris la PEA-prezidanto Swistak. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de Esperanto-organizoj el socialismaj landoj.

Pri gastlaboristoj en Aŭstrio

Vieno (pp) Ni publikigas ĉi-sekve la semajnan komentarion de la Esperanto-elsendoj de Radio Wien de la 22/23 marto 1975 verkita de d-ro Peter Dusek kaj prezentita de d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal:

"Kontraste al preskaŭ ĉiuj siaj najbaroj, Aŭstrio frontis ĝis nun la problemon de tro-okupiteco. Malrapide, sed nehaltigeble, tiu epoko finiĝas. Pli kaj pli ofte ni aŭdas, ke estas fermita, jen tiu entrepreno, jen alia. Ĉu ni daŭre povos reinstrui la maldungitojn por aliaj laborpostenoj? Ke nia ekonomio, en internacia komparo ankoraŭ bonŝanca, pruviĝos ankaŭ en ĉi tiu jaro iom kreskinta, tion ni ŝuldas antaŭ ĉio al la racia sinteno de la sociaj partneroj, al nia ĉarma, la turismon loganta pejzaĝo, kaj al demokrata matureco de niaj politikistoj dum la jaroj de la unupartiaj registaroj: inter 1966 kaj 1970 la popolpartia, ekde tiam la socialista.

En la ĵus pasinta semajno, ekzemple, ĉiuj partioj akceptis, unuanime, la leĝon pri la gastlaboristoj, kvankam temis esence pri la mult-diskutita "sekurigo de la labormerkato".

Denove kaj denove efikas antaŭjuĝoj kontraŭ la dungitoj el Jugoslavio, Turkio kaj Italio. Post kiam ili alvenis centmil-ope, logitaj de la altkonjunkturo, ne ĉesis la skandaloj pri ilia loĝigo, pri provoj profiti el ilia nescio de nia lingvo. La nova leĝo malebligas ĉion tion, garantiante al la gastlaboristoj homdignan, ne-amasan loĝadon je ordinaraj luprezoj, labor- kaj salajrojuran sekurecon, eĉ higienan kontrolon, profilaktajn ekzamenojn, kaj simile.

Aliflanke, kiam entrepreno likvidiĝos, la maldungo trafos unue la gastlaboristojn. Car estas, kompreneble, pli malfacile ŝanĝi sian postenon vivante kun familio, en eksterlando. Tamen la bono por la gastlaboristoj superregas en tiu leĝo, ŝarĝante multajn aŭstrajn firmaojn tre senteble - ankaŭ per tute novaj taskoj. Ĝia tamen unuanima akcepto atestas pozitive pri la aŭstra demokratio - antaŭkondiĉo por plua ekonomia progreso. Kaj ne nur la eksterlandanaj dungitoj profitos el tio!"

# Konkurso de Pola Radio

En la 1975 j. pasos la 30-a datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno ni petas pri respondo al jena demando:

**Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30-a datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?**

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, P. O. Box 46, en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso", ĝis la 9-a de majo 1975 j. — decidas la dato de la posta stampo.

La rezultojn de la lotado ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15-an de junio 1975 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo fiksota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO
Warszawa